LUDVIG HOLBERG

JEPPE SUR LA MONTO

aŭ

LA TRANSFORMITA KAMPARANO

Komedio en kvin aktoj

1722

Tradukis: Odd Tangerud

Roluloj:

- JEPPE sur la Monto
- NILLE, lia edzino
- JAKOB, ŝuisto
- Barono NILUS
- Sekretario de la barono
- Ĉambristo
- ERIK, lakeo
- Aliaj lakeoj
- Intendanto
- La edzino de la intendanto
- Juĝisto
- MAGNUS

UNUA AKTO

UNUA SCENO

NILLE

Mi opinias, ke en la tuta kamparo ne troviĝas tia mallaborema aĉulo kiel mia edzo; mi preskaŭ ne kapablas veki lin, kiam mi tiras lin el la lito per la haroj. Hodiaŭ tiu aĉulo scias, ke estas foirtago, kaj tamen kuŝas dormante tiom longe. Sinjoro Poŭl antaŭ nelonge diris al mi: "Nille, vi estas tro severa kontraŭ via edzo; li estas kaj devas ja esti mastro de la domo;" sed mi respondis al li: "Ne, mia bona sinjoro Poŭl! Se mi lasus al mia edzo mastrumi la domon unu jaron, tiam la Grandsinjoro ne ricevus lupagon por la tero nek la pastro dekonaĵon; ĉar dum tiu tempo li fordrinkus ĉion, kio estas en la domo. Ĉu mi lasu al tiu viro estri la domon, kiu estas preta vendi brutaron, edzinon kaj infanojn, jes eĉ sin mem, por brando?" Kaj jen sinjoro Poŭl tute silentis kaj viŝis sian buŝon. La intendanto samopinias kun mi kaj diras: "Patrineto, vi nur ne atentu pri tio, kion la pastro diras. Vere estas skribite en la ritaro, ke vi estu obeema kaj humila al via edzo, sed kontraŭe staras en via lukontrakto, kiu estas pli nova ol la ritaro, ke vi tenu vian farmon en ordo kaj pagu la lupagon, kio por vi ne eblas, se vi ne ĉiun tagon tiras vian edzon laŭ la haroj kaj lin bastonadas al laboro." Ĵus mi tiris lin el la lito, kaj iris en la garbejon por vidi kiel progresas la laboro; kiam mi revenis internen, li sidis sur la seĝo dormante kun la pantalono, pardonu la esprimon, sur nur unu gambo, pro kio la skurĝo devis tuj elkroĉiĝi, kaj mia bona Jeppe ŝmiriĝi sur la dorso, ĝis li komplete revekiĝis. La sola, kion li timas, estas "Majstro Erik", (tiel mi nomas la skurĝon).—Hej, Jeppe! ĉu vi bruto ankoraŭ ne vestis vin? Ĉu vi ankoraŭfoje ŝatus paroli kun "Majstro Erik"? Hej, Jeppe, envenu!

DUA SCENO

JEPPE

Mi bezonas ja tempon por vesti min, Nille. Mi vere ne povas iri al la urbo kiel porko sen pantalono kaj jako.

NILLE

Ĉu vi sentaŭgulo ne havis tempon por surmeti dek parojn da pantalonoj, post kiam mi vekis vin ĉimatene?

JEPPE

Ĉu vi formetis "Majstron Erik", Nille?

NILLE

Jes, mi faris; sed mi tuj scias kie trovi ĝin, se vi ne rapidas. Jen, ĉi tien! Vidu kiel li rampas. Jen, ĉi tien! Vi iru al la urbo por aĉeti al mi du funtojn da verda sapo. Jen mono. Sed aŭdu! Se vi post kvar horoj ne retroviĝos surloke, "Majstro Erik" dancu polan dancon sur via dorso.

JEPPE

Kiel iri kvar mejlojn en kvar horoj, Nille?

NILLE

Kiu diras ke vi iru, vi kornulo? Vi kuru. Jen mia verdikto; kaj nun vi faru laŭ plezuro.

TRIA SCENO

JEPPE

(sola) Nun tiu porkino eniras por matenmanĝi, kaj mi, kompatindulo, devas iri kvar mejlojn, kaj ricevas nek fluidaĵon nek sekaĵon. Ĉu iu viro havas tian damnan edzinon, kian mi havas? Mi vere opinias, ke ŝi estas kuzino de Lucifero. Oni ja diras en la vilaĝoj, ke Jeppe trinkas, sed ili ne diras kial Jeppe trinkas; ĉar mi ne ricevis tiom da batoj dum la dek jaroj, kiam mi estis en la malicistaro, kiom mi ricevas unu tagon de tiu malica virino. Ŝi batas min, la intendanto pelas min al laboro kiel bruton, kaj la diakono faras min kornulo. Ĉu mi do ne trinku? Ĉu mi do ne uzu la rimedojn, kiujn la naturo donas al ni por forigi aflikton? Se mi estus stultulo, tiaĵoj ne frapus mian koron tiom forte, kaj mi ankaŭ ne trinkus; sed estas klare, ke mi estas sprita viro; tial mi sentas tiajn ofendojn pli forte ol aliulo; tial mi devas trinki. Mia najbaro Mons Kristofersen ofte diras al mi, ĉar li estas mia bona amiko: La diablo penetru vian dikan ventron, Jeppe! Vi devus kontraŭfrapi, kaj la edzinaĉo mildiĝus. Sed mi ne povas kontraŭfrapi pro tri kialoj. Unue ĉar mi ne havas kuraĝon. Due pro la damnita "Majstro Erik", kiu pendas malantaŭ la lito, kaj pri kiu mia dorso ne povas pensi sen plori. Trie ĉar mi, sen laŭdi min mem, estas bonkorulo kaj bona kristano, kiu neniam serĉas venĝon, eĉ ne kontraŭ la diakono, kiu metas sur min kornon post korno; kaj tamen mi oferdonas al li la tri sanktajn tagojn, eĉ se ne estas en li honorsento por doni al mi kruĉon da biero la tutan jaron. Nenio tuŝis mian koron pli forte, ol la mokaj vortoj, kiujn li diris al mi la pasintan jaron; ĉar kiam mi rakontis al li, ke sovaĝa taŭro, kiu neniam timis homojn, foje fariĝis timema antaŭ mi, li respondis: Ĉu tion vi ne komprenas, Jeppe? La taŭro vidis, ke vi havas pli grandajn kornojn ol ĝi mem havas, kaj tial ne opiniis konsilinde kornopiki kun sia superulo. Mi vokas vin kiel atestantojn, bonuloj! Ĉu tiaj vortoj ne enpenetrus ĝis la medolo de ostoj en honesta viro. Mi tamen estas tiom deca, ke mi neniam deziris morton al mia edzino. Kontraŭe

kiam ŝi kaptiĝis de flavmalsano la pasintan jaron, mi deziris, ke ŝi vivu; ĉar pro tio ke Infero jam estas plena de malbonaj virinoj, Lucifero eble sendus ŝin reen, kaj ŝi fariĝus pli malica ol ŝi jam estas. Sed se la diakono mortus, mi ĝojus, tiom pro mi mem kiom pro aliuloj; ĉar li estas nura ĝeno kaj neniel utila por la paroĥanaro. Estas malklera diablo; ĉar li kantas false, kaj eĉ ne povas muldi respektindan vaks-kandelon. Sed lia antaŭulo Kristofer estis tute alia. Li tone superis dek du diakonojn en sia tempo, tian voĉon li havis. Iun fojon mi decidis rompi kun la diakono, dum Nille mem aŭskultis; ĉar li insulte nomis min kornulo, kaj mi diris: La diablo estu via kornulo, Mads diakono! Sed kio okazis? "Majstro Erik" devis tuj elkroĉiĝi kaj disigi la kverelantojn, kaj mia dorso fariĝis tiom draŝata de mia edzino, ke mi devis peti pardonon de la diakono, kaj danki lin pro tio, ke li, bone studinta homo, volis fari tiun honoron al mia domo. De tiam mi neniam ekpensis kontraŭstari. Nu, ja, Mons Kristofersen! por vi kaj aliaj farmistoj estas facile paroli, kies edzinoj ne havas iun "Majstron Erik" malantaŭ la lito. Se plenumus al mi deziro en ĉi mondo, mi dezirus, ke aŭ mia edzino neniun brakon havus, aŭ mi neniun dorson; ĉar la buŝon ŝi uzu kiom plaĉas al ŝi.—Sed mi devas iri al Jakob ŝuisto survoje; li certe verŝos al mi brandon kredite por ŝilingo; ĉar mi devas havi iom por refreŝiĝi. Hej! Jakob ŝuisto! ĉu vi ellitiĝis? Malfermu, Jakob!

KVARA SCENO

(Jakob ŝuisto, nur en ĉemizo. Jeppe.)

JAKOB
Kiu vizitas tiom diable frue?

JEPPE
Bonan matenon, Jakob ŝuisto!

JAKOB
Dankon, Jeppe! vi estas ege frue survoje hodiaŭ.

JEPPE
Verŝu al mi por ŝilingo da brando, Jakob.

JAKOB
Jes, donu la ŝilingon.

JEPPE
Vi ricevos ĝin morgaŭ, kiam mi revenos.

JAKOB

Jakob ŝuisto ne verŝas kredite. Mi scias, ke certe vi havas ŝilingon aŭ du por pago.

JEPPE

Honto pro tia mensogo, Jakob; nur kelkajn ŝilingojn, kiujn mia edzino donis al mi por aĉeti ion en la urbo.

JAKOB

Mi scias, ke certe vi povos marĉandi du ŝilingojn de la varoj, kiujn vi aĉetos. Kiu estas via komerco?

JEPPE

Mi aĉetu du funtojn da verda sapo.

JAKOB

Ej, ĉu vi ne povas diri, ke vi pagis ŝilingon aŭ du pli por la funto ol vi faros?

JEPPE

Mi timas, ke mia edzino sciiĝos pri tio; kaj tiam mi gustumos la skurĝon.

JAKOB

Babilaĉo! Kie ŝi sciiĝus pri tio? Ĉu vi ne povas ĵuri, ke vi pagis la tutan sumon? Vi estas stulta kiel bruto.

JEPPE

Vere, vere, Jakob; jen kion mi fine povos fari.

JAKOB

Elmetu vian monon, do.

JEPPE

Jen! sed vi devas redoni al mi ŝilingon ŝanĝe. (Jakob eliras.)

JAKOB

(envenas kun la glaso, saluttrinkas) Je via sano, Jeppe!

JEPPE

Vi glutis kiel fripono.

JAKOB

Ĉu? Mi ja scias ke estas kutimo, ke la gastiganto saluttrinkas al la gastoj.

JEPPE

Mi certe scias; sed honto al tiu, kiu enkondukis tiun kutimon. Sanon, Jakob!

JAKOB

Dankon, Jeppe! Vi trinkos ankaŭ por la dua ŝilingo; vi ja ne povas ĝin reen kunporti, sen havi glason da brando bonhave, kiam vi revenos. Ĉar kredu min, mi havas eĉ ne unu ŝilingon por redoni al vi ŝanĝe.

JEPPE

Hontu, kiu faros! Se ĝi estu glutata, do okazu tuj, tiel ke mi sentu la stomakon iom pleniĝi. Sed se vi ankaŭ el tiu trinkas, mi nenion pagos.

JAKOB

Sanon, Jeppe!

JEPPE

Dio gardu niajn amikojn, kaj honto al ĉiuj niaj malamikoj! Tio bonfaris en la stomako. Aĥ, Aĥ!

JAKOB

Bonan vojaĝon, Jeppe!

JEPPE

Dankon, Jakob ŝuisto!

KVINA SCENO

JEPPE

(sola; fariĝas gaja kaj komencas kanti:)

"Blanka kokino kaj plurkolora kokinokontraŭstaris kokon (k.t.p.) ..."

Aĥ, se mi kuraĝus trinki por kroma ŝilingo! Aĥ, se mi kuraĝus trinki por kroma ŝilingo! Mi faru! Ne, ŝi draŝos min. Se nur eblus unue forigi la trinkejon el vido, ne estus problemo; sed estas kvazaŭ iu kapte retenas min. Mi devas ree tien. Ho ne, kion vi faros, Jeppe? Mi vidas Nille kvazaŭ staranta en la vojo kun "Majstro Erik" en la mano. Mi devas turni.—Aĥ, se mi kuraĝus trinki ankoraŭ por unu ŝilingo! Mia stomako diras faru; mia dorso diras ne. Kiun mi kontraŭfaru? Ĉu ne mia stomako pli gravas ol mia dorso? Mi opinias ke jes. Ĉu mi frapu la pordon? Hej, Jakob ŝuisto, elvenu! Sed la damnita virino image aperas. Se ŝi almenaŭ nur frapus tiel, ke la dorsostoj ne difektiĝus, mi diable ne atentus; sed ŝi frapas kiel.... Aĥ Dio gardu min, kompatindulon! Kion mi faru? Devigu vian naturon, Jeppe! ĉu ne estas honto, ke vi kapsaltu en malfeliĉon pro kanajla glaso da brando? Ne, tio ne okazu; mi devas for.—Aĥ, se mi kuraĝus ankoraŭ trinki por unu nura ŝilingo! Estis fatale, ke mi unue gustumis; nun mi ne kapablas foriri. Kruroj for! Demono

splitu vin, se vi ne iros! Ne, tiuj kanajloj damne ne volas. Ili volas reen al la trinkejo. Miaj membroj militas unu kontraŭ alia: La stomako kaj la kruroj volas al la trinkejo, kaj la dorso al la urbo. Iru do, vi hundaĉoj! Vi brutoj! Vi sentaŭguloj! Ne, diablo pelu ilin; ili volas reen al la trinkejo. Mi pli penas pri miaj gamboj igi ilin foriri de la trinkejo, ol konduki mian ĉevalon el ĝia ejo. Aĥ, se mi kuraĝus ankoraŭ trinki por nura ŝilingo! Kiu scias ĉu Jakob ŝuisto ne kreditos min por ŝilingo aŭ du, kiam mi humile petas lin?—Hej, Jakob! kroman glason da brando por du ŝilingoj.

SESA SCENO

JAKOB

Jen Jeppe! Ĉu vi revenis? Mi pensis, ke vi ricevis tro malmulte. Kiel brando por du ŝilinga monero sufiĉu? Ĝi ja eĉ ne pasas sub la kolo.

JEPPE

Vere, Jakob! Donu por kroma duŝilingvaloro; (Jakob eliras. Jeppe sola.) Kiam mi unue eltrinkis, li devas ja krediti, ĉu vole, ĉu nevole.

JAKOB

Jen brando por du ŝilingoj, Jeppe, sed unue la monon.

JEPPE

Vi vere povas krediti min dum mi trinkas, kiel diras la proverbo.

JAKOB

Ni ne konsideras proverbojn, Jeppe. Se vi ne antaŭe pagos, vi ricevos eĉ ne guton. Ni ĵuris neniun krediti, eĉ ne la intendanton mem.

JEPPE

(plorante) Ĉu vi ne tamen povas krediti min? Mi ja estas honesta homo.

JAKOB

Neniun krediton!

JEPPE

Jen do la du ŝilingoj, vi avarulo!—Pagite; kaj nun vi trinku, Jeppe!—Aĥ, bone ĝi efikis.

JAKOB

Jes, povas baki kanajlon interne.

JEPPE

La plej granda efiko de brando estas, ke oni poste fariĝos tiom kuraĝa. Nun mi ne plu pensas pri mia edzino kaj nek pri “Majstro Erik”; tiel mi transformiĝis de la lasta glaso. Ĉu vi konas tiun ĉi kanton, Jakob?

Kirsten kaj Peder sidis ĉe tablo!Peteheja!Aŭdiĝis tioma senhonta fablo.Polemeja!Sturno kantas el gaja sino.Peteheja!Inferen iru Nille, la aĉulino.Polemeja!Iris mi sur la verda grundo.Peteheja!Diakono estas fia hundo.Polemeja!Kantis birdo el sia nesto,Peteheja!Diakono estas fia besto.Polemeja!Ĉu diru mi nomon de la edzino?Peteheja!Nomiĝas ŝi Honto kaj MalhonorinoPolemeja!

Tiun kanton mi mem faris, Jakob.

JAKOB

Vi? diable ne!

JEPPE

Jeppe ne estas tiom stulta, kiom vi opinias. Mi ankaŭ faris kanton pri la ŝuistoj, kiu iras tiel:

La ŝuisto kun siaj violono kaj bas’,Filepom! Filepom!

JAKOB

Aj, vi stultulo! tiu temas pri muzikistoj.

JEPPE

Jes, vere. Aŭdu, Jakob! verŝu por ankoraŭ unu ŝilingo.

JAKOB

Bone! Nun mi vidas, ke vi estas afabla homo, kiu ne avaras ŝilingon por mia domo.

JEPPE

Hej, Jakob! Nur donu al mi por jenaj kvar ŝilingoj.

JAKOB

Jen bone.

JEPPE

(denove kantas)

La tero trinkas akvon,La maro trinkas sunon,La suno trinkas maron,ĉio en la mondo trinkas.Kial do mi neankaŭ tiel trinku?

JAKOB
Sanon, Jeppe!

JEPPE
Mir zu!

JAKOB
Sanon duone!

JEPPE
Ich tank Ju Jakob! Trinku *mann, dat dig di Dyvel haal; dat ist dig* sen envio.[1]

[Piednoto 1—Traduko el platgermana: Mi dankas vin, Jakob. Trinku, homo, ke la Diablo vin alprenu; tiu estas la via...]

JAKOB
Mi aŭdas, ke vi scias paroli germane, Jeppe.

JEPPE
Certe; estas malnovaĵo, *dat*; sed mi ne volonte tiel parolas, krom kiam mi estas ebria.

JAKOB
Nu, do vi tiel parolas almenaŭ unu fojon tage.

JEPPE
Mi servis dek jarojn en la malicistaro, kaj ĉu mi do ne komprenu miajn lingvojn?

JAKOB
Vere mi scias, Jeppe. Ni ja kune servis en la kumpanjo du jarojn.

JEPPE
Estas vere, nun mi memoras. Oni ja pendigis vin iun fojon, kiam vi forfuĝis ĉe *Wismar*.

JAKOB
Mi estis proksime, sed oni denove pardonis. “Proksimo helpas multajn homojn”.

JEPPE
Domaĝe ke ili ne pendigis vin, Jakob. Sed ĉu vi ne partoprenis en la atakcio sur tiu altebenaĵo, vi ja mem scias kie?

JAKOB
Aj, kie mi ne ĉeestis?

JEPPE

Mi neniam forgesas la unuan psalmon, kiun la svedoj pafis. Mi opinias ke mortfalis samtempe 3000, aŭ diru 4000 homoj. *Das ging fordyvled zu, Jakob! Du kanst wol das ihukommen? Ich kan nicht negten, dass ich jo bange war*[2] ĉe tiu batalego.

[Piednoto 2—Traduko el platgermana: Okazis malbenite, Jakob! Vi ja povas memori, ĉu? Mi ne povas nei, ke mi estis timema...]

JAKOB

Jes ja! Severe estas kontraŭiri la morton. Antaŭ la malamiko oni estas ja sufiĉe pia.

JEPPE

Jes, vere; mi ne scias pro kio; ĉar mi kuŝis la tutan nokton antaŭ la atakcio legante la psalpetron de Davido.

JAKOB

Mirigas min, ke vi, kiu antaŭe estis soldato, permesas al via edzino vin tirani.

JEPPE

Mi! Ke mi nur havus ŝin ĉi tie, kaj jen vi vidus kiel mi ŝin bastonadus. Ankoraŭ unu glason, Jakob! (al si mem) Ankoraŭ restas al mi ok ŝilingoj, kaj kiam ili estos fortrinkitaj, mi trinkos kredite. (laŭte) Verŝu al mi ankaŭ kruĉon da biero!

In Leipsig var en Mand,In Leipsig var en Mand,In Leipsig var en Læderen Mand,In Leipsig var en Læderen Mand,In Leipsig var en Mand,Die Mand han nam en Fru, (K.t.p.)

JAKOB

Sanon, Jeppe!

JEPPE

Hej! He...j! He...! Je via sano kaj je mia sano kaj je la sano de ĉiuj bonaj amikoj! He... He...j!

JAKOB

Ĉu vi ne volas tosti por la intendanto?

JEPPE

Certe jes! Verŝu por kromaj kvar ŝilingoj. La intendanto estas estiminda viro. Kiam ni kaŝdonas al li taleron, li ĵuras je la savo de sia animo antaŭ la Grandsinjoro, ke ni ne kapablas pagi la farman luon.—Kanajlo kiu havas pli da mono. Vi kreditas min por ŝilingo aŭ du.

JAKOB

Ne, Jeppe! nun vi ne eltenas trinki pli. Mi ne estas tia viro, ke mi deziras, ke la gastoj tro ebriigu sin en mia domo kaj trinku pli ol bone estas por ili. Mi pli ŝatus perdi mian komercon ol tiel konduti; ĉar estas peko.

JEPPE

Hej! ankoraŭ por ŝilingo!

JAKOB

Ne, Jeppe, nun mi ne pli verŝas. Pensu, ke vi devas iri longan vojon.

JEPPE

Kanajlo! Kadavraĉo! Besto! Fripono! Hej, He...j!

JAKOB

Adiaŭ, Jeppe,—feliĉan vojaĝon!

SEPA SCENO

JEPPE

(sola) Aĥ, Jeppe; vi estas ebria kiel besto. Miaj gamboj ne volas porti min. Staru, vi kanajloj? Hej do! Kioma horo estas? Hej, Jakob hundsvot, skuster![3] Hej, por ŝilingo! Staru, vi hundoj! Ne, diablo prenu min ĉu ili volas stari. Dankon, Jakob ŝuisto! Ankoraŭ unu. Aŭskultu, kamarado! Kien la vojo al la urbo? Staru, mi diras. Jen! La besto estas ebria. Vi trinkis kiel kanajlo, Jakob! ĉu tio estas brando por ŝilingo? Vi mezuras kiel turko.

(Dum li parolas, li falas kaj restas kuŝanta.)

[Piednoto 3—Ege insultaĉa frazo. Hundsvot: hundinfikilo. Skuster: ŝuistaĉo.]

OKA SCENO

(Barono Nilus, la sekretario, la ĉambristo, du lakeoj, Jeppe.)

BARONO

Aspekte ni havos fekundan jaron. Jen, vidu kiom densa la hordeo staras.

SEKRETARIO

Jes, vere, Via Moŝto; sed tio signifas, ke barelo da hordeo ĉijare ne valoros pli ol kvin markojn.

BARONO

Ne gravas. La farmistoj ja prosperas pli bone dum bonaj tempoj.

SEKRETARIO

Mi ne scias kiel estas, Via Moŝto; la farmistoj ja ĉiam plendas, kaj volas havi semgrenon, ĉu la jaro estas fekunda aŭ ne. Kiam ili ion havas, ili drinkas des pli. Jen loĝas trinkejestro en la najbareco, kiu nomiĝas Jakob ŝuisto, kaj tiu multe kontribuas fari la farmistojn malriĉaj. Oni diras, ke li ŝutas salon en la bieron, por ke ili pli soifu, des pli ili trinkas.

BARONO

Tiun ulon ni devas forigi.—Sed kio kuŝas tie apud la vojo? Estas ja mortinto. Oni aŭdas pri nenio krom akcidentoj. Kuru unu, kaj rigardu, kio estas.

UNUA LAKEO

Estas Jeppe sur la Monto, kiu havas la malican edzinon. Hej ekstaru, Jeppe! Ne, li ne vekiĝas eĉ se ni batus lin aŭ tirus lin laŭ la haroj.

BARONO

Lasu lin kuŝi; mi tamen ŝatus fari komedion kun li. Vi kutime estas riĉaj pri ideoj. Ĉu vi povus inventi ion por min distri?

SEKRETARIO

Aspektus amuze, se oni ligus paperkolumon ĉirkaŭ lin, aŭ fortondus liajn harojn.

ĈAMBRISTO

Laŭ mi estus ankoraŭ pli amuze ŝmiri lian vizaĝon per inko kaj posteni iujn por vidi, kiel lia edzino lin akceptus, kiam li revenus hejmen en tia stato.

BARONO

Bone, bone. Sed ĉu eble Erik elpensus ion ankoraŭ pli amuzan? Jen, diru vian opinion, Erik.

ERIK LAKEO

Mi proponas, ke ni tute devestu lin kaj kuŝigu lin en la plej bonan liton de Via Moŝto, kaj en la mateno, kiam li vekiĝos, ni kondutu al li, kvazaŭ li estas la sinjoro de la bieno, tiel ke li ne sciu kia kaj kio li estas. Kaj kiam ni tiel kredigos al li, ke li estas la Barono, ni trinkigu lin tiom same ebria, kiom li nun estas, kaj kuŝigu lin en liaj malnovaj vestaĵoj sur tiun saman sterkejon. Se tia plano lerte efektiviĝus, la efiko estus stranga, kaj li imagus, aŭ ke li sonĝis pri tia feliĉego, aŭ ke li vere estis en Paradizo.

BARONO

Erik, vi estas lertulo, kaj tial havas nur lertajn projektojn. Sed kion fari se li vekiĝus sammomente?

ERIK

Mi certas, ke li ne faros, Via Moŝto; ĉar tiu sama Jeppe sur la Monto estas unu el la plej persistaj dormemuloj en la tuta vilaĝaro. La pasintan jaron oni provis fiksi raketon al lia nuko; sed kiam la raketo ekflamiĝis, li tamen ne vekiĝis el sia dormo.

BARONO

Tion faru. Fortiru lin tuj, surmetu al li belan ĉemizon, kaj kuŝigu lin en mian plej bonan liton.

DUA AKTO

UNUA SCENO

JEPPE

(Kuŝanta en la lito de la Barono kun orpasamenta negliĝo sur seĝo. Li vekiĝas kaj frotas siajn okulojn, rigardas ĉirkaŭen, konsterniĝas, ree frotas la okulojn, palpas sian kapon kaj per la mano ekkaptas orbroditan noktoĉapon. Li ŝmiras kraĉaĵon sur la okulojn kaj ree frotas ilin, turnas la ĉapon kaj rigardadas ĝin, rigardadas sian belan ĉemizon, kaj la negliĝon, ĉion; grimacas strange. Intertempe ludiĝas kvieta muziko, kaj aŭdante tion Jeppe kunplektas la manojn kaj ploras. Kiam la muziko estas finita, li komencas paroli:)

Ej, kio estas tio? Kia pompo estas jeno, kaj kiel estas mi al jeno veninta? Ĉu mi sonĝas, aŭ ĉu mi estas maldorma? Jes, mi estas klare maldorma. Kie estas mia edzino, kie estas miaj infanoj, kie estas mia domo, kaj kie estas Jeppe? Ĉio estas ŝanĝita, eĉ mi mem. Ej, kio do estas tio ĉi? Kio do estas tio ĉi?

(Krias mallaŭte kaj timeme)

Nille! Nille! Nille! Mi kredas, ke mi venis en la ĉielon, Nille! kaj tio tute senmerite.—Tamen ĉu vere estas mi? Aspektas al mi, ke jes; aspektas ankaŭ al mi, ke ne. Kiam mi palpas mian dorson, kiu ankoraŭ suferas pro la batoj, kiujn mi ricevis, kiam mi aŭdas min paroli, kiam mi palpas mian kavan denton, ŝajnas al mi, ke estas mi. Sed se mi rigardas mian ĉapon, mian ĉemizon, la tutan lukson antaŭ miaj okuloj, kaj aŭskultas tiun dolĉan muzikon, jen diablo splitu min ĉu mi povas imagi, ke estas mi. Ne estas mi; mil fojojn mi estu kanajlo se estas. Sed ĉu eble mi sonĝas? Tamen ŝajnas al mi ke ne. Mi provos pinĉi mian brakon; se tiam

ne doloras, jen mi sonĝas; se doloras, jen mi ne sonĝas.—Jes, mi sentis; mi estas maldorma. Certe mi estas maldorma; tion neniu povas disputi; ĉar se mi ne estis maldorma, mi ja ne povis.... Sed kiel mi povas esti maldorma, kiam mi vere pripensas? Ne povas esti erare, ke mi ja estas Jeppe sur la Monto; mi ja scias, ke mi estas malriĉa farmisto, sklavo, fripono, kornulo, malsata pediko, larvo, kanajlo; kiel mi povas samtempe esti Imperiestro kaj Sinjoro sur kastelo? Ne, jeno tamen estas nur sonĝo. Plej bone estas, ke mi paciencu ĝis mi vekiĝos.

(La muziko rekomencas, kaj Jeppe ankoraŭfoje ekploras.)

Aĥ! ĉu eblas ion tian aŭdi en dormo? Ne eblas. Sed se estas sonĝo, ke mi neniam revekiĝu! kaj se mi estas en deliro, ke mi neniam refariĝu saĝa; ĉar mi alvokus antaŭ tribunalon tiun kuraciston, kiu kuracus min, kaj malbenus tiun, kiu vekus min. Sed mi nek sonĝas nek deliras; ĉar mi memoras ĉion, kio okazis al mi. Mi ja memoras, ke mia karmemora patro estis Nils sur la Monto, mia avo Jeppe sur la Monto, mia edzino ja nomiĝas Nille, ŝia skurĝo "Majstro Erik", miaj filoj Jens, Nils kaj Kristofer. Ho jen! nun mi eltrovis kio estas: estas la alia vivo, estas Paradizo, estas la ĉielo. Eble hieraŭ mi drinkis min morta ĉe Jakob ŝuisto, mortis kaj tuj venis en ĉielon. La morto do ne estas tiel terura sperto kiel oni imagas; ĉar mi nenion sentis. Nun eble en ĉi momento staras Sinjoro Jesper sur la pupitro farante enterigan predikon super mi; eble li diras: Tian finon ricevis Jeppe sur la Monto; li vivis kiel soldato kaj mortis kiel soldato. Oni povas disputi ĉu mi mortis surtere aŭ surakve; ĉar mi eliris sufiĉe humida el tiu ĉi mondo. Aĥ, Jeppe! tio estas io alia ol piede iri kvar mejlojn al la urbo por aĉeti sapon, kuŝi sur pajlo, esti batata de via edzino kaj ricevi kornojn de la diakono. Aĥ, al kia feliĉego estas via peno kaj viaj maldolĉaj tagoj transformitaj. Aĥ, mi devas plori pro ĝojo, precipe kiam mi pensas, ke tio okazis al mi tute senmerite. Sed unu penso laboras en mia kapo; nome ke mi estas tiom soifa, ke miaj lipoj gluiĝas. Se mi dezirus denove esti viva, estus nur por ricevi kruĉon da biero por refreŝigi min; ĉar al kio jena pompo antaŭ la okuloj kaj ĉe la oreloj, kiam mi mortu denove pro soifo? Mi memoras, ke la pastro ofte diris, ke en la ĉielo oni nek malsatas nek soifas, kaj ankaŭ ke tie oni retrovos ĉiujn siajn mortintajn amikojn; sed mi ĝismorte turmentiĝas pro soifo; krome mi estas ja tute sola, mi vidas eĉ ne unu homon; mi devus ja almenaŭ trovi mian avon, kiu estis tia deca homo, kiu postlasis eĉ ne ŝilingon de nepagita ŝuldo al la biena Sinjoro. Mi ja scias, ke multaj homoj vivis same dece kiel mi; kial mi do sola venu en ĉielon? Do ne eblas, ke estas la ĉielo. Sed kio do estas? Mi ne dormas, mi ne maldormas; mi ne mortis, mi ne vivas; mi ne deliras, mi ne estas saĝa; mi estas Jeppe sur la Monto, mi ne estas Jeppe sur la Monto; mi estas malriĉa, mi estas riĉa; mi estas mizera farmisto, mi estas Imperiestro. A... A... A...! Helpu! Helpu! Helpu!

(Je tiu laŭta kriado envenas kelkaj homoj, kiuj tamen antaŭe staris kaŝe por vidi, kiel li kondutas.)

DUA SCENO

(Ĉambristo. Erik Lakeo. Jeppe.)

ĈAMBRISTO
Mi deziras al Via Moŝto bonan matenon. Jen la negliĝo, se Via Moŝto volas ellitiĝi.—Erik, kuru serĉi la mantukon kaj la lavujon.

JEPPE
Aĥ, estimata sinjoro ĉambristo, mi vere volas ellitiĝi; sed mi petas, ke vi nenion malbonan faru al mi.

ĈAMBRISTO
Dio gardu nin de ion malbonan fari al Sinjoro.

JEPPE
Aĥ, antaŭ ol mortigi min, bonvolu diri al mi, kiu mi estas?

ĈAMBRISTO
Sinjoro ne scias, kiu Li estas, ĉu?

JEPPE
Hieraŭ mi estis Jeppe sur la Monto, sed hodiaŭ.... Aĥ, mi ne scias kion diri.

ĈAMBRISTO
Estas al ni ĝojige, ke Sinjoro hodiaŭ estas en tiom bona humoro, ke plaĉas al Li ŝerci. Sed Dio gardu nin, kial Via Moŝto ploras?

JEPPE
Mi ne estas Via Moŝto. Mi povas ĵuri je la savo de mia animo, ke tio mi ne estas; ĉar laŭ mia memoro, mi estas Jeppe, filo de Nils sur la Monto, unu el la farmistoj de la Barono. Se vi vokos mian edzinon, vi scios; sed ne lasu ŝin kunpreni "Majstron Erik".

LAKEO
Strange. Kio do estas tio? Sinjoro certe ne estas tute vekita; ĉar Li neniam tiel kutimas ŝerci.

JEPPE
Ĉu mi maldormas aŭ ne, tion mi ne povas diri; sed tion mi scias kaj povas diri, ke mi estas unu el la farmistoj de la Barono, kaj mi nomiĝas Jeppe sur la Monto, kaj mi neniam estis Barono nek Grafo en mia vivotempo.

ĈAMBRISTO

Erik, kio tio povas esti? Mi timas, ke Sinjoro kaptiĝis de malsano.

ERIK

Mi imagas, ke li somnambulas; ĉar ofte okazas, ke homoj ellitiĝas, vestas sin, parolas, manĝas kaj trinkas dum dormo.

ĈAMBRISTO

Ne, Erik; mi rimarkas, ke Sinjoro fantazias pro malsano. Kuru tuj voki kelkajn kuracistojn! (Erik foriras) Aĥ, Via Moŝto, forpelu tiajn pensojn el via kapo! Via Moŝto ja ĵetas timon en la tutan domon. Ĉu Via Moŝto ne konas min?

JEPPE

Mi ne konas min mem; kiel mi konus Vin?

ĈAMBRISTO

Aĥ, ĉu eblas, ke mi aŭdu tiajn vortojn el la buŝo de Mia Moŝto, kaj vidi Lin en tia stato? Aĥ, nia malfeliĉa domo, turmentata de tia sorĉa magio!—Ĉu Sinjoro ne memoras, kion Li faris hieraŭ, kiam Li rajdis ĉase?

JEPPE

Mi neniam estis ĉasisto nek ŝtelĉasisto; ĉar mi scias, ke tio donas punlaboron. Neniam iu animo pruvu, ke mi ĉasis leporon sur la bieno de Sinjoro.

ĈAMBRISTO

Aĥ, Via Moŝto! Mi ja mem akompanis Lin en la ĉaso hieraŭ.

JEPPE

Hieraŭ mi sidis ĉe Jakob ŝuisto kaj trinkis por dek du ŝilingoj da brando; kiel mi do povis fari ĉason?

ĈAMBRISTO

Aĥ, mi insiste petas Vian Moŝton sur miaj genuoj, ke li forlasu tiajn diraĵojn.—Erik, ĉu oni vokis la kuracistojn?

ERIK

Jes! ili tuj venos.

ĈAMBRISTO

Ni do metu sur Sinjoron lian negliĝon; ĉar eble kiam Li venos eksteren en la liberan aeron, lia stato pliboniĝos.—Ĉu Sinjoro bonvole surmetu la negliĝon.

JEPPE

Jes, bonvole. Vi faru pri mi kiel al vi plaĉas, se vi nur ne mortbatu min; ĉar mi estas tiel senkulpa, kiel infano en patrina ventro.

TRIA SCENO

(Du kuracistoj. Jeppe. Ĉambristo. Erik.)

UNUA KURACISTO
Kun aflikto ni aŭdas, ke Sinjoro malbonfartas.

ĈAMBRISTO
Aĥ ja, sinjoro Doktoro! Li estas en mizera stato.

DUA KURACISTO
Kiel vi fartas, Via Moŝto?

JEPPE
Sufiĉe bone. Mi nur estas iom soifa post tiu brando, kiun mi ricevis de Jakob ŝuisto hieraŭ. Bonvolu doni al mi nur kruĉon da biero, kaj lasu min foriri; poste oni bone povas pendigi vin kaj ĉiujn kuracistojn; ĉar mi ne bezonas medicinon.

UNUA KURACISTO
Tion mi vere nomas fantaziado, sinjoro Kolego.

DUA KURACISTO
Ju pli forta ĝi estas, des pli rapide ĝi forvaporos. Palpu la pulson de Sinjoro. *Quid tibi videtur, Domine Frater?*[4]

[Piednoto 4—Latinfrazo: Kiel ŝajnas al vi, Sinjora Frato?]

UNUA KURACISTO
Mi opinias, ke li bezonas kupumon.

DUA KURACISTO
Mi ne samopinias; ĉar tiajn strangajn malfortecojn oni devas kuraci alimaniere. Sinjoro havis teruran kaj strangan sonĝon, kiu fluigis la sangon kaj konfuzis la cerbon tiel, ke Li imagas sin esti farmisto. Ni devas provi distri Sinjoron per tiuj aferoj, kiuj kutime plej plaĉas al Li, doni al Li tiujn specojn de vino kaj manĝaĵo, kiujn Li pleje ŝatas, kaj ludi por Li la melodiojn, kiujn Li prefere aŭskultas.

(Gaja muziko komenciĝas.)

ĈAMBRISTO

La ŝatmuziko de Sinjoro!

JEPPE
Povas esti. Ĉu ĉiam estas tia gajeco ĉi tie en la bieno?

ĈAMBRISTO
Tiom ofte kiom plaĉas al Sinjoro; ĉar Li donas al ni ĉiuj manĝaĵon kaj salajron.

JEPPE
Sed estas strange, ke mi ne memoras, kion mi antaŭe faris.

DUA KURACISTO
La malsano kaŭzas, Via Moŝto, ke oni forgesas ĉion, kion oni antaŭe faris. Mi memoras, ke antaŭ kelkaj jaroj unu el miaj najbaroj, pro forta drinkado, tiom konfuziĝis, ke dum du tagoj li imagis, ke li estas sen kapo.

JEPPE
Mi estus kontenta, se distrikta juĝisto Kristofer spertus la saman. Sed li certe havas malsanon, kiu estas tute kontraŭa; ĉar li imagas sin havi grandan kapon, kvankam li havas tute neniun, kiel oni povas konstati per liaj verdiktoj.

(Ili ridas. Ha, ha, ha!)

DUA KURACISTO
Estas plezuro aŭskulti Sinjoron ŝerci. Sed por reveni al la rakonto, tiu sama viro trairis la tutan urbon, kaj demandis al preterpasantoj, ĉu iu trovis la kapon, kiun li perdis; sed feliĉe li resaniĝis kaj nuntempe estas sonorilisto en Jutlando.

JEPPE
Tio li ja povus fariĝi, kvankam li ne retrovus sian kapon.

(Ili ridas denove. Ha, ha, ha!)

UNUA KURACISTO
Ĉu sinjoro Kolego memoras la historion, kiu okazis antaŭ dek jaroj pri viro, kiu imagis sin havi plenplenon da muŝoj en sia kapo, kaj ne povis liberiĝi el tiuj fantaziaĵoj, kiom ajn konvinke oni klarigis al li, ĝis saĝa doktoro kuracis lin tiel: Sur lian kapon li metis plastron surŝutitan de mortaj muŝoj, kiun li post iom da tempo fortiris, kaj montris al la malsanulo la muŝojn. Tiu imagis, ke ili estis tiritaj el lia kapo, kaj tiel fariĝis sana. Mi ankaŭ aŭdis rakonton pri alia viro, kiu post longedaŭra febro fariĝis konfuzita, kaj li kredis, ke se li eligus sian akvon, la tuta lando subakviĝus. Neniu povis tiri lin el tiuj ideoj; ĉar li volis morti pro la komuna bono. Li estis sanigita laŭ jena maniero: Oni sendis mesaĝon al li ŝajne de la Komandanto, dirante ke la urbo estas en danĝero de sieĝo. Ne estas akvo en la remparaj fosaĵoj. Ĉu li volus plenigi ilin por malhelpi al la malamiko eniron en

la urbon? La malsanulo ĝojiĝis, ĉar li povis servi al sia patrolando kaj al si mem samtempe, kaj tiel li liberiĝis de sia akvo kaj ankaŭ de sia malsano.

DUA KURACISTO

Mi povas montri ekzemplon el alia historio, kiu okazis en Germanio. Nobelo iam envenis gastejon, kaj post manĝo li volis enlitiĝi. Li pendigis sian oran kolĉenon, kiun li kutime portis, sur la muron en la gastejo. La gastejestro atente observis lin, akompanis lin al la lito, kaj deziris al li bonan nokton; sed kiam li rimarkis ke la nobelo dormis, li ŝteliris en la ĉambron kaj forprenis 60 erojn el la ĉeno, kaj poste rependigis ĝin sur la muron. La gasto ellitiĝas en la mateno, seligas sian ĉevalon kaj surmetas siajn vestojn. Sed kiam li ekligis la ĉenon ĉirkaŭ sian kolon, li perceptis ke el ĝi perdiĝis la duono de ĝia longo. Li tuj komencis krii, ke iu lin priŝtelis. La gastejestro, kiu ŝtelaŭskultis ekster la pordo, tuj alkuras, kaj ŝajnigas esti funde konfuzita. Li ekkriis: Aĥ, kia terura ŝanĝo! Kiam la gasto demandis, kial li tiel reagis, li diris: Aĥ, Sinjoro! Via kapo fariĝis duoble pli granda, ol ĝi estis hieraŭ. Poste li enportis falsan spegulon, kiu montris ĉion en duobla grando. Kiam nun la nobelo vidis sian kapon tiom granda en la spegulo, li ekploris, kaj diris: Aĥ nun mi konstatas la kaŭzon, pro kiu mia ĉeno fariĝis tro mallonga. Li surseliĝis, kaj volvis sian mantelon ĉirkaŭ sian kapon por ke neniu vidu ĝin survoje. Oni diras, ke poste li tenis sin hejme multajn tagojn, kaj ne povis liberiĝi el tiuj fantaziaĵoj, sed kredis, ke la ĉeno estis tro mallonga ĉar la kapo fariĝis tro dika.

UNUA KURACISTO

Estas multaj ekzemploj pri tiaj fantaziaĵoj. Mi memoras pri iu, kiu imagis al si, ke lia nazo estas dek futojn longa, kaj avertis ĉiujn, kiuj venis renkonte, ke ili ne tro proksimiĝu.

DUA KURACISTO

Domine Frater certe aŭdis la historion pri tiu viro, kiu imagis al si, ke li estas morta. Juna persono ekfantaziis, ke li estas morta, kaj tial kuŝigis sin en ĉerkon, kaj volis nek manĝi nek trinki. Liaj amikoj klarigis al li la stultaĵon, kaj provis ĉiujn rimedojn por igi lin manĝi, sed vane. Li rifuzis kun rido, dirante ke estas kontraŭ ĉiuj reguloj, ke mortintoj manĝu kaj trinku. Fine spertulo pri medicino prenis sur sin kuraci lin per stranga metodo. Li petis serviston prezenti sin kiel mortinton, kaj kun ĉiuj solenaĵoj lasi sin porti al la sama loko, kie kuŝas la malsanulo. Tiuj du longe kuŝis rigardante unu la alian. Fine la malsanulo komencis pridemandi al la alia, kial li tien estis portita; kaj tiu respondis: ĉar li estas morta. Poste ili komencis demandi unu al la alia pri la maniero per kiu ili mortis, kaj ambaŭ detalplene rakontis. Poste iuj laŭ sekreta interkonsento enportis vespermanĝon al la laste “mortinta”, kaj jen tiu elĉerkiĝis kaj ekhavis bonegan manĝon, dirante al la alia: Ĉu ne ankaŭ vi baldaŭ manĝu? La malsanulo miris, kaj

demandis ĉu konvenas al mortulo manĝi, sed ricevis la respondon, ke se li ne manĝas, li ne povas pli longe esti morta. Li do unue lasis sin persvadi manĝi kune kun la alia, poste dormi, ekstari, sin vesti, jes, li ĉiel imitis la alian, ĝis li refariĝis vivanta kaj prudenta. Mi povus doni sennombre pli da ekzemploj pri tiaj strangegaj fantaziaĵoj. Tiel ankaŭ okazis pri Lia Moŝto, ke Li imagas sin esti malriĉa farmisto. Sed Lia Moŝto devas forpeli tiajn imagojn el sia menso, kaj jen Li tuj resaniĝos.

JEPPE
Sed ĉu eblas, ke estas nur fantaziaĵoj?

KURACISTO
Certe jes! El tiuj historioj Sinjoro aŭdis, kian efikon fantaziaĵoj povas havi?

JEPPE
Ĉu mi do ne estas Jeppe sur la Monto?

KURACISTO
Certe ne!

JEPPE
Kaj la malica Nille ne estas mia edzino, ĉu?

KURACISTO
Neniel; ĉar Sinjoro estas vidvo.

JEPPE
Ĉu ankaŭ tio estas fantaziaĵo, ke ŝi havas skurĝon, kiu nomiĝas “Majstro Erik”?

KURACISTO
Nura fantaziaĵo.

JEPPE
Kaj ne estas vero, ke mi devis iri al la urbo por aĉeti sapon?

KURACISTO
Ne.

JEPPE
Ankaŭ ne, ke mi fortrinkis la monon ĉe Jakob ŝuisto?

ĈAMBRISTO
Ej! Sinjoro faris ja ĉason kune kun ni la tutan hieraŭon.

JEPPE
Eĉ ne ke mi estas kornulo?

ĈAMBRISTO
Aj! Sinjorino ja mortis antaŭ multaj jaroj.

JEPPE
Aĥ, mi jam komencas percepti mian malsanon. Mi ne plu pensu pri tiu farmisto; ĉar mi komprenas, ke sonĝo kondukis min en tiun konfuzon. Tamen estas strange kiel homoj povas lasi sin kapti en tiajn fantaziaĵojn.

ĈAMBRISTO
Ĉu Sinjoro bonvolas iom promenadi en la ĝardeno, dum ni ion pretigas por la matenmanĝo?

JEPPE
Jes ja; sed devas okazi rapide; ĉar mi estas kaj malsata kaj soifa.

TRIA AKTO

UNUA SCENO

(Jeppe. Barono, alivestita kiel sekretario. Ĉambristo kaj pluraj servistoj.)

(Jeppe venas el la ĝardeno kun sia sekvantaro, kaj tableto estas pretigita.)

JEPPE
Ha ha! Mi vidas, ke la tablo jam estas preta.

ĈAMBRISTO
Jes, ĉio estas preta, kiam konvenas al Via Moŝto sidiĝi.

(Jeppe sidigas sin. La aliaj staras malantaŭ lia seĝo kaj ridas pri liaj aĉaj manieroj, kiam li per ĉiuj kvin fingroj prenas el la plado, ruktas super la tablon, purigas la nazon per la fingroj kaj ŝmiras sur la vestojn.)

ĈAMBRISTO
Sinjoro bonvole indiku, kiun vinon li deziras?

JEPPE

Vi ja mem scias kiun vinon mi kutimas trinki matene.

ĈAMBRISTO

Estas la rejna vino, kiun Sinjoro plej ŝatas trinki. Se ĝi ne plaĉas al Sinjoro, li tuj ricevos alian.

JEPPE

Ĝi estas iom tro seka. Verŝu iom da medo en ĝin, kaj ĝi pliboniĝos; ĉar mi multe ŝatas la dolĉan.

ĈAMBRISTO

Jen kanari-sek, se Sinjoro bonvolas gustumi.

JEPPE

(trinkas) Ĝi estas bona vino. Toksu ĉiuj! (ĉiun fojon kiam li trinkas, oni sonorigas trumpetojn.)

JEPPE

Hej, atentu, uloj! Ankoraŭ glason da kanajlo-sek, vi komprenas, ĉu?—Kie vi ricevis tiun ringon, kiun vi portas sur la fingro?

SEKRETARIO

Sinjoro mem donis ĝin al mi.

JEPPE

Tion mi ne memoras; redonu ĝin; mi certe faris en ebrio. Tiajn ringojn oni ja ne fordonas. Poste mi ekzamenos kiujn aliajn aĵojn vi ricevis. Servistoj ne havu pli ol manĝaĵon kaj salajron. Mi povas ĵuri, ke mi ne memoras ke mi donacis al vi ion aparte; ĉar kial mi farus? Tiu ringo valoras ja pli ol dek talerojn. Ne, ne, vi bonuloj! Ne tiel, ne tiel. Vi ne devas misuzi la malfortan animon kaj drinkemon de via Sinjoro. Kiam mi estas ebria, mi estas preta fordoni eĉ mian pantalonon; sed kiam mi fordormigis la ebriecon, mi reprenas miajn donacojn. Alie mi spertus la skurĝon de mia edzino Nille. Aj, kion mi diras? Nun mi refalas en la antaŭajn stultajn pensojn kaj ne memoras, kiu mi estas. Pli da kanajlo-sek. Saman Sanon!

(Trumpetoj sonoriĝas.)

JEPPE

Atentu kion mi diras, uloj! De nun jeno estu por vi instrukcio, ke kiam mi en la vespero ion donacas en ebrieco, tion vi redonu matene. Kiam servistoj ricevas pli ol ili povas manĝi, ili fariĝas arogantaj kaj fiere rektigas la nukon antaŭ siaj sinjoroj.—Kioman salajron ricevas vi?

SEKRETARIO

Sinjoro ĉiam donis al mi 200 talerojn jare.

JEPPE

Je Diablo, de nun vi ne havu 200 talerojn; kiom vi utilas por 200 taleroj? Mi mem devas peni kiel bruto kaj stari en la grenejo de mateno ĝis vespero kaj povas apenaŭ.... Jen, nun revenas tiuj damnitaj farmistfantazioj. Kroman glason da vino.

(Li trinkas denove, kaj la trumpetoj sonoriĝas.)

JEPPE

200 talerojn! Estas ja senhaŭtigo de sia Sinjoro. Jen, aŭskultu, bonuloj! Kiam mi estos manĝinta, mi intencas pendigi ĉiun duan en la bieno. Sciu, ke mi ne lasas al mi priŝerci en monaferoj.

ĈAMBRISTO

Ni redonos ĉion, kion ni ricevis de Via Moŝto.

JEPPE

Jes, jes "Via Moŝto, Via Moŝto!" Da komplimentoj kaj baslemenoj[5] vi havas sufiĉe ĉitempe. Vi buŝe flatas min per via "Via Moŝto", ĝis vi forportis mian tutan monon, kaj vi mem fariĝos moŝtoj. La buŝo diras: "Via Moŝto", sed la koro "Via Azeno". Vi ne diras, kion vi pensas, vi uloj; Vi dungitoj estas kiel Abner, kiu salutante Roland diris: Saluton al vi, mia frato! kaj jen li pikas la ponardon en lian koron. Kredu min, ke Jeppe ne estas stultulo.

[Piednoto 5—Manokisoj. Malpuraĵo el la franclingva, "je vous baise les mains,"—mi kisas viajn manojn.]

(Ĉiuj genufalas kaj petas indulgon.)

JEPPE

Ekstaru, uloj! Atendu, ĝis mi manĝfinas; poste mi ekzamenos kiel statas, kaj kiuj meritas pendigon aŭ ne. Nun mi volas amuziĝi.—Kie estas mia intendanto?

ĈAMBRISTO

Li estas ekstere.

JEPPE

Tuj envenigu lin.

DUA SCENO

INTENDANTO

(en arĝentbutonumita frako, kun sabro ĉe la talio) Via Moŝto ion ordonas?

JEPPE
Nenion krom pendigi vin.

INTENDANTO
Mi ja neniun krimon faris, Via Moŝto! kial mi do estu pendigota?

JEPPE
Vi estas intendanto, ĉu ne?

INTENDANTO
Jes, mi estas, Via Moŝto.

JEPPE
Kaj tamen vi demandas kial vi estu pendigota?

INTENDANTO
Mi ja servis Vian Moŝton fidele kaj honeste, kaj diligente laboris en mia posteno, tiel ke Via Moŝto ĉiam laŭdis min antaŭ siaj aliaj servistoj.

JEPPE
Jes, certe vi estis diligenta en via posteno; tion oni ja vidas pro viaj butonoj el muldita arĝento. Kiun salajron vi ricevas jare?

INTENDANTO
Duonan centon da taleroj jare.

JEPPE
(paŝadas tien kaj reen) Duonan centon da taleroj? Jes, vi tuj estu pendigota.

INTENDANTO
Ne povas ja esti malpli, Via Moŝto, por peniga servo dum tuta jaro.

JEPPE
Ĝuste pro tio al la pendigilo, ĉar vi ne ricevas pli ol duonan centon da taleroj. Vi havas monon por frako kun arĝentaj butonoj, por bordaĵoj ĉe la manoj, por silka saketo ĉe la hararo kaj ricevas nur duonan centon jare. Ĉu vi do ne ŝtelas de mi, kompatindulo? ĉar de kie vi alie ricevus tiujn riĉaĵojn?

INTENDANTO
(surgenue) Aĥ, Via Moŝto! kompatu min pro mia malriĉa edzino kaj pro miaj neplenaĝaj infanoj.

JEPPE
Ĉu vi havas multajn infanojn?

INTENDANTO

Mi havas sep infanojn en vivo, Via Moŝto.

JEPPE

Ha, ha! sep infanojn en vivo? Rapide, pendigu lin, sekatario!

SEKRETARIO

Aĥ, Via Moŝto! Mi ja ne estas ekzekutisto.

JEPPE

Kio vi ne estas, vi povos fariĝi; vi aspektas ĉiaspece kapabla. Kiam vi estos pendiginta lin, mi mem poste vin pendigos.

INTENDANTO

Aĥ, Via Moŝto! ĉu ne estas pardono?

JEPPE

(denove paŝadas, eksidas por trinki, ekstaras denove) Duonan centon da taleroj, edzinon kaj sep infanojn! Se neniu alia pendigos vin, mi mem tion faros. Mi bone scias kiaj uloj vi estas, vi intendantoj; mi scias kiel vi traktis min mem kaj aliajn kompatindajn farmistojn.... Aj! jen revenas tiuj damnitaj farmistfantaziaĵoj en mian kapon. Mi dirus, ke mi konas vian konduton kaj viajn manovrojn tiel bone surfingre, ke mi mem povus esti intendanto, se necese. Vi senkremigas la lakton, kaj la Sinjoroj ricevas fekaĵon, pardonu la esprimon. Mi kredas, ke se la mondo longe staros, intendantoj fariĝos junkroj kaj junkroj fariĝos intendantoj. Kiam farmisto ion kaŝe donas al vi aŭ al viaj edzinoj, vi aŭdigos al la Sinjoro: La kompatindulo estas sufiĉe laborema kaj diligenta, sed pluraj akcidentoj okazis al li, tiel ke li ne povas pagi; li havas nefekundan teron, skabio atakis lian brutaron kaj tiel plu, kaj per tiu babilaĉo la sinjoroj devas lasi sin kontentigi. Kredu min, bonulo, mi ne lasas min tiri per la nazo; ĉar mi mem estas farmisto kaj filo de farmisto.... Jen, nun revenas tiu sorĉo! Mi diras, ke mi mem estas filo de farmisto; ĉar Abrahamo kaj Eva, niaj unuaj gepatroj, estis terkulturistoj.

SEKRETARIO

(genue) Aĥ, Via Moŝto! estu kompatema pro lia malriĉa edzino; ĉar el kio ŝi nutru patrinon kaj infanojn?

JEPPE

Kiu diras, ke ili vivu? Oni pendigu ilin samtempe.

SEKRETARIO

Aĥ, Sinjoro! estas tiom ĉarma, bela virino.

JEPPE

Nu? Eble vi mem amas ŝin, ĉar vi tiom zorgas por ŝi? Enkonduku ŝin.

(La virino envenas kaj kisas lian manon.)

JEPPE

Ĉu vi estas la edzino de la intendanto?

VIRINO

Jes, mi estas, Via Moŝto.

JEPPE

(tuŝas ŝian mamon) Vi estas bela. Ĉu vi volas kuŝi kun mi ĉinokte?

VIRINO

Via Moŝto ordonas en ĉio; ĉar mi estas en Lia servo.

JEPPE

(al la intendanto) Ĉu vi permesas, ke mi kuŝos kun via edzino ĉinokte?

INTENDANTO

Mi dankas al Via Moŝto, ke Li volas fari tiun honoron al mia domo.

JEPPE

Jen! Metu seĝon por ŝi; ŝi manĝu kune kun mi.

(Ŝi eksidas ĉe la tablo, manĝas kaj trinkas kun li; li fariĝas ĵaluza al la sekretario kaj diras:)

JEPPE

Vi spertos akcidenton, se vi rigardas ŝin.

(Tiom ofte kiom li ekrigardas la sekretarion, tiu tuj fordirektas sian rigardon de ŝi kaj rigardas teren. Jeppe kantas malmodan amkanton, dum li sidas ĉetable kun ŝi; li ordonas ke oni ludu polan dancon, kaj dancas kun ŝi, sed falas tri fojojn pro drinkado; fine la kvaran fojon li restas kuŝanta kaj endormiĝas.)

BARONO

(kiu ĝis nun aktoris kiel sekretario) Li jam dormas profunde. Nun ni gajnis la ludon; sed preskaŭ ni mem staris en moko; ĉar li intencis nin tirani, pro kio ni aŭ devus vanigi la historion, aŭ lasi nin malbone trakti de tiu kruda farmisto, el kies konduto oni povas lerni, kiom tiranaj kaj arogantaj fariĝas tiaj homoj, kiuj el la koto tro rapide venas al honoro kaj digno. Preskaŭ estis malfeliĉa momento, kiam mi prenis rolon de sekretario; ĉar se li min batus, estus malagrabla historio, kiu ĵetus sur min ne malpli da mokado ol sur tiun farmiston. Plej bone estas, ke ni lasu lin ankoraŭ iom dormi, antaŭ ol ni denove surmetu al li liajn malpurajn farmistvestaĵojn.

ERIK

Aj Sinjoro! li jam dormas kiel ŝtono; jen vidu! mi povas lin bati, li tion ne sentas.

BARONO

Elkonduku lin, kaj finu la komedion.

KVARA AKTO

UNUA SCENO

(Jeppe kuŝas sur sterkejo en siaj malnovaj farmistvestaĵoj. Li vekiĝas kaj krias:)

JEPPE

Hej, Sekatario! Ĉambristo! Lakeoj! Pli da kanajlo-sek!

(Rigardas ĉirkaŭen kaj frotas siajn okulojn same kiel antaŭe, palpas sian kapon kaj kaptas sian malnovan larĝan ĉapelon, frotas la okulojn kaj turnas la ĉapelon ĉiuflanken, rigardas siajn vestaĵojn, kaj rekonas sin mem; komencas paroli:)

Kiom longe estis Abrahamo en Paradizo? Mi nun bedaŭrinde rekonas ĉion, mian kuŝejon, mian jakon, mian malnovan kornul-ĉapelon, min mem. Jen, Jeppe, io alia ol trinki kanajlon-sek el orumitaj glasoj, sidi ĉetable kun lakeoj kaj sekatarioj malantaŭ la seĝo. La feliĉo bedaŭrinde neniam daŭras longe. Aĥ, aĥ! ke mi, kiu estis tia sinjora Moŝto antaŭ nelonge, vidu min en tia aĉa stato, mia ornamita lito nun sterkejo, mia orbrodita ĉapo malnova kornulĉapelo, miaj lakeoj porkoj, kaj mi mem de grandsinjoro reŝanĝita al kompatinda farmisto! Mi imagis, kiam mi revekiĝis, ke mi trovus miajn fingrojn kun oraj ringoj; sed ili portas, permesu la esprimon, sigelon de io tute alia. Mi intencis postuli respondecon de miaj servistoj; sed nun mi devas mem pretigi mian dorson, kiam mi revenos hejmen por respondeci pri miaj agoj. Mi imagis, kiam mi vekiĝis, preni glason da kanajlo-sek', sed ricevis, por dece paroli, fekbulon en la manon. Aĥ, aĥ, Jeppe! tiu loĝado en Paradizo daŭris mallonge, kaj via ĝojo ekhavis rapidan finon. Sed kiu scias, ĉu la sama ne povus okazi al mi, se mi ankoraŭfoje endormiĝos? Aĥ, aĥ! ke tio okazu al mi! Aĥ, ke tio revenu!

(Kuŝigas sin por dormi.)

DUA SCENO

NILLE

Ĉu eble mi kredu, ke iu akcidento okazis al li? Kiel do tio povas esti? Aŭ la diablo prenis lin, aŭ, kion mi pli timas, li sidas en gastejo kaj fordrinkas la monon. Mi estis stulta konfidi al tiu drinkemulo dek du ŝilingojn je unu fojo.— Sed kion mi vidas? Ĉu li ne kuŝas ronkante tie en la sterko? Aĥ, mi kompatinda homo, kiu havu tian bruton kiel edzon! Via dorso pagu sufiĉe multekoste.

(Ŝteliras silente kaj donas al li frapon de "Majstro Erik" sur la pugo.)

JEPPE

Aj, Aj! Helpu, Helpu! Kio estas? Kie mi estas? Kiu batas min? Kial oni batas min? Aj!

NILLE

Mi tuj instruu al vi kio estas.

(Frapas lin denove kaj tiras lin per la haroj.)

JEPPE

Aĥ, kara Nille! ne frapu min pli! Vi ne scias kio okazis al mi.

NILLE

Kie vi drinkemulo tiom longe estis? Kie estas la sapo, kiun vi devis aĉeti?

JEPPE

Mi ne povis atingi la urbon, Nille!

NILLE

Kial vi ne povis atingi la urbon?

JEPPE

Survoje mi estis levita al Paradizo.

NILLE

Al Paradizo! (batas lin) Al Paradizo! (denove batas lin) Al Paradizo! (batas lin denove). Vi eĉ volas mistifiki min, ĉu?

JEPPE

A-a-a! Tiel vere, kiel mi estas honesta viro, mi diras la veron.

NILLE

Kio estas vero?

JEPPE

Ke mi estis en Paradizo.

(Nille ripetas: En Paradizo! kaj daŭre frapas lin.)

JEPPE

Aĥ, karega Nille! ne frapu min plu!

NILLE

Rapide, konfesu kie vi estis, aŭ mi murdos vin.

JEPPE

Aĥ, mi volonte konfesos kie mi estis, se vi ne plu frapas min.

NILLE

Do, konfesu.

JEPPE

Ĵuru, ke vi ne plu batos min.

NILLE

Ne.

JEPPE

Tiel vere kiel mi estas honesta viro kaj nomiĝas Jeppe sur la Monto, estas vero, ke mi estis en Paradizo kaj vidis aferojn, kiuj mirigos vin aŭdi.

(Nille denove batas lin kaj tiras lin internen per la haroj.)

TRIA SCENO

NILLE

(sola) Jen, vi besta drinkulo! Nun unue eldormu la ebriecon; poste ni plue kunparolu. Tiaj porkoj, kia vi estas, ne venas al Paradizo. Imagu kiel tiu bruto fordrinkis sian prudenton. Sed se li sin regalis je mia kosto, li ankaŭ honeste pro tio pentu; ĉar dum du tagoj li ricevu nenion sekan nek malsekan. Post tiam certe forlasos lin la fantaziaĵoj pri Paradizo.

KVARA SCENO

(Tri armitaj viroj venas.)

TRI VIROJ
Ĉu ne ĉi tie loĝas viro, kiu nomiĝas Jeppe?

NILLE
Jes, li loĝas.

TRI VIROJ
Ĉu vi estas lia edzino?

NILLE
Jes, bona Dio, bedaŭrinde!

TRI VIROJ
Ni devas paroli kun li.

NILLE
Li estas tute ebria.

TRI VIROJ
Ne malhelpas. Tuj eligu lin, aŭ akcidento okazos al la tuta domo.

(Nille eniras, kaj elpuŝas Jeppe kun tia rapideco, ke li renversas unu el la tri viroj kun si laŭ la planko.)

KVINA SCENO

JEPPE
Aĥ, aĥ, vi bonaj viroj; nun vi vidas kun kia edzino mi devas vivaĉi.

TRI VIROJ
Vi nenian alian traktadon meritas; ĉar vi estas krimulo.

JEPPE
Kion malbonan mi do faris?

TRI VIROJ
Tion vi tuj scios antaŭ la tribunalo.

SESA SCENO

(Jeppe. La tri viroj. Juĝisto. Du advokatoj. Atestanto.)

(La juĝisto envenas kune kun kroma asistanto kaj eksidas sur sia seĝo. Jeppe manligita dorse estas kondukata antaŭ la tribunalon.)

ATESTANTO

(antaŭenpaŝas kaj kulpigas lin tiel:) Jen estas viro, sinjoro Juĝisto, kiun ni ateste vidis enŝteliĝi en la domon de la Barono, ŝajnigi esti Lia Moŝto, surmeti liajn vestaĵojn, tirani liajn servistojn; kaj ĉar tio estas nekredeble impertinenta konduto, ni postulas nome de nia Sinjoro, ke li estu aparte severe punata kiel fortimiga ekzemplo por aliaj perfortuloj.

JUĜISTO

Ĉu estas vere, kion oni imputas al vi? Eldiru por via defendo; ĉar ni volas neniun kondamni neaŭditan.

JEPPE

Aĥ, mi kompatindulo! kion mi diru? Mi konfesas, ke mi meritas punon, sed nur pro la mono, kiun mi fordrinkis, kaj por kiu mi devis aĉeti sapon. Krome mi konfesas, ke mi ĵus estis en iu kastelo. Sed kiel mi tien envenis, kaj kiel mi ree elvenis, mi ne scias.

UNUA ADVOKATO

Jen Juĝisto mem aŭdas el lia propra konfeso, ke li ebriiĝis kaj en ebrio faris tian abomenan krimon, ke nun nur restas verdikti, ĉu tia kruda krimulo povas senkulpigi sian krimon per ebrieco. Mi opinias, ke ne! Ĉar tiel nek malĉasteco nek murdo estus punebla; ĉiu ajn serĉus pretekstojn, kaj dirus, ke estis farita en ebrieco. Kaj, kvankam li povas pruvi ke li estis ebria, lia afero tamen ne pliboniĝas; ĉar estas dirite: Pro kio oni faras en ebrieco, oni punpagu kiam oni senebriiĝas. Estas ja konate, ke pro tia krimo viro ĵus estis punata, kvankam la krimulo lasis sin el naiveco delogi, kaj ŝajnigis, ke li estus Sinjoro; sed lia naiveco kaj stulteco ne povis savi lin de la morto. Ĉar puno sole ekzistas kiel ekzemplo por aliuloj. Mi rakontus la historion, se mi ne timus per tio tro longigi la proceson.

DUA ADVOKATO

Estimata sinjoro Juĝisto! Jena proceso aspektas al mi tiel stranga, ke mi ne kapablas kredi, ke la afero tiel vere okazis, kvankam estus pliaj atestantoj. Simplanima farmisto enŝteliĝus en la biendomon de Sinjoro, kaj prezentus sin kiel lian personon, sen surpreni lian vizaĝon kaj staturon? Kiel li povus penetri en la dormo-ĉambron de Sinjoro? Kiel li povus surmeti la vestaĵojn de Sinjoro, sen esti observata de iu? Ne, sinjoro Juĝisto! oni povas vidi, ke estas fikcia intrigo de la malamikoj de tiu kompatinda viro. Mi do esperas, ke li estu absolvata.

JEPPE

(ploranta) Bona Dio benu vian buŝon! Mi havas pecon da tabako en mia pantalonpoŝo, se vi ne volas rifuzi; ĝi estas sufiĉe bona por ĉiu honestulo, kiu volas maĉi.

DUA ADVOKATO
Gardu nur vian tabakon, Jeppe! Ke mi defende parolas por vi, ne celas donacon aŭ trinkaĵon, sed okazas sole pro kristana kompato.

JEPPE
Pardonu, sinjoro Prokuratoro! mi ne opiniis, ke homoj el via profesio estas tiom honestaj.

UNUA ADVOKATO
Kion mia Kolego prezentas por liberigo de tiu krimulo, tio baziĝas nur sur supozoj. Ĉi tie ne estas demando ĉu estas verŝajne ke tia ago povas okazi aŭ ne; pruvoj prezentiĝas ke okazis, pruvoj kaj de atestantoj kaj de lia propra konfeso.

DUA ADVOKATO
Se homo konfesas en timo kaj teruro, tia konfeso ne validas. Tial mi opinias plej bone doni al tiu naivulo tempon pripensi, kaj denove pridemandi lin.

JUĜISTO
Aŭskultu, Jeppe! pripensu kion vi diras. Ĉu vi konfesas tion, pro kio oni akuzas vin?

JEPPE
Ne! mi faros sanktan ĵuron, ke estas mensogo ĉio, kion mi ĵuris antaŭe; ĉar mi ne eliris el mia domo dum tri tagoj.

UNUA ADVOKATO
Sinjoro Juĝisto! mi firme opinias, ke ne rajtas ĵuri iu, kontraŭ kiu unue atestantoj prezentis pruvojn, kaj kiu poste mem konfesis sian krimon.

DUA ADVOKATO
Mi opinias, ke jes.

UNUA ADVOKATO
Mi opinias ke ne.

DUA ADVOKATO
Ĉar la akuzo aspektas tiom strange.

UNUA ADVOKATO
Neniuj cirkonstancoj helpas kontraŭ atestantoj kaj konfeso.

JEPPE

(mallaŭte) Ke ili ekflamu en interbatado; kaj jen mi samtempe ekkaptus la juĝiston, kaj draŝus lin tiom, ke li forgesus kaj leĝon kaj preskribon.

DUA ADVOKATO

Sed aŭskultu, sinjoro Kolego! kvankam estas konfeso pri la misfaro, la viro tamen ne meritas punon; ĉar li ja nenion malbonan faris sur la bieno, nek murdon nek ŝtelon.

UNUA ADVOKATO

Tio estas indiferenta; *intentio furandi* egalas *furtum*.[6]

[Piednoto 6—Latinfrazo: intenco ŝteli egalas ŝtelon.]

JEPPE

Parolu danlingve, vi nigra hundo! Tiam ni respondos!

UNUA ADVOKATO

Ĉar egale ĉu li kaptiĝas kiam li volas ŝteli, ĉu kiam li estas ŝtelinta, li tamen estas ŝtelisto.

JEPPE

Aĥ, sinjoro Juĝisto! mi pretas pendi, se tiu prokuratoro pendu flanke de mi.

DUA ADVOKATO

Ĉesu pri tiaj vortoj, Jeppe! vi nur pli fuŝas vian aferon per tio.

JEPPE

Kial do vi ne respondas? (mallaŭte:) Li staras kiel stulta bruto.

DUA ADVOKATO

Sed kiel atestiĝas tiu *furandi propositum?*[7]

[Piednoto 7—Latinfrazo: ŝtelada deklaro.]

UNUA ADVOKATO

Quicunqve in ædes alienas noctu irrumpit tanqvam fur aut nocturnus grassator existimandus est, atque reus hic ita, ergo...[8]

[Piednoto 8—Latinfrazo: Kiu ajn nokte en aliulan domon enrompas, devas esti rigardata kiel ŝtelisto aŭ nokta tumultulo, kaj tial kulpa, do...]

DUA ADVOKATO

Nego majorem, qvod scilicet irruperit.[9]

[Piednoto 9—Latinfrazo: Mi neas la antaŭan, ke li certe enrompis.]

UNUA ADVOKATO

Res manifesta est, tot legitimis testibus extantibus ac confitente reo.[10]

[Piednoto 10—Latinfrazo: La afero evidenta estas, tiom da laŭrajtaj atestantoj estante kaj la kulpulo konfesante.]

DUA ADVOKATO

Quicunqve vi vel metu coactus fuerit confiteri...[11]

[Piednoto 11—Latinfrazo: Kiu ajn estas devigita konfesi aŭ perforte aŭ per timo....]

UNUA ADVOKATO

Aj! kie estas tiu *Vis*? kie estas tiu *Metus*?[12] Tio estas nur leĝimplikoj.

[Piednoto 12—Latinfrazo: (...) perforto? (...) timo?]

DUA ADVOKATO

Ne, vi aplikas leĝimplikojn.

UNUA ADVOKATO

Pro tio neniu honesta viro kulpigu min.

(Ili kaptas unu la alian bruste, kaj Jeppe kuras malantaŭ la unuan advokaton kaj detiras ties perukon.)

JUĜISTO

Respektu la tribunalon! Ĉesu; mi jam havas sufiĉe.

(Legas la verdikton:)

"Ĉar Jeppe sur la Monto, filo de Nils sur la Monto kaj nepo de Jeppe samloke, konvinke kulpiĝis, kaj de leĝaj atestantoj kaj de sia propra konfeso, pro enŝteliĝo en la kastelon de la Barono, surmeto de ties vestaĵoj kaj kruela traktado de ties servistoj, li kondamniĝas al morto per veneno, kaj kiam li estos morta, lia korpo estu pendigata."

JEPPE

(surgenue) Aĥ! aĥ! Estimata Juĝisto! Ĉu ne estas pardono?

JUĜISTO

Ne, neniel. La verdikto tuj efektiviĝu en mia ĉeesto.

JEPPE

Aĥ, ĉu mi ne ricevu glason da brando unue, antaŭ ol mi trinkos la venenon, por ke mi mortu kuraĝa?

JUĜISTO

Jes, tion ni povas permesi.

JEPPE

(trinkas tri glasojn da brando, denove falas genue kaj demandas:) Ĉu ne estas pardono?

JUĜISTO

Ne, Jeppe, nun estas tro malfrue.

JEPPE

Aĥ, neniam estas tro malfrue. La Juĝisto ja povas ŝanĝi la verdikton kaj diri, ke la unuan fojon li verdiktis erare. Tio jam ofte okazas; ĉar ni ja ĉiuj estas homoj.

JUĜISTO

Ne, vi mem sentos post kelkaj minutoj, ke estas tro malfrue; ĉar vi jam ricevis la venenon kune kun la brando.

JEPPE

Aĥ mi kompatinda homo! Ĉu mi jam glutis la venenon? Aĥ, adiaŭ, Nille! Kvankam, vi virinaĉo! vi ne meritas, ke mi adiaŭu vin. Adiaŭ Jens, Nils, kaj Kristofer! Adiaŭ mia filino Marte! Adiaŭ mia plej favorata! Pri vi mi scias, ke mi estas via patro; vi ja havas la vizaĝon de via patro; ni egalas unu la alian kiel du gutoj de akvo. Adiaŭ mia plurkolora ĉevalo, kaj dankon pro ĉiu fojo kiam mi rajdis sur vi; post miaj propraj infanoj mi neniun beston amis kiel vin. Adiaŭ Fejerfaks, mia fidela hundo kaj gardanto de la pordo! Adiaŭ Mons, mia nigra kato! Adiaŭ miaj bovoj, miaj ŝafoj, miaj porkoj! kaj dankon pro bona kompanio kaj pro ĉiu tago, kiam mi konis vin. Adiaŭ.... Aĥ nun mi ne plu povas, tiom mi fariĝas peza kaj senforta. (Li falas kaj restas kuŝanta)

JUĜISTO

Plenumiĝis bone. La dormigilo jam efikis; nun li dormas kiel ŝtono. Pendigu lin; sed zorgu, ke li ne vundiĝas, kaj ligu la ŝnuron nur sub liaj brakoj. Nun ni volas vidi kiel li sin tenos kiam li vekiĝos kaj trovos sin pendanta. (Ili fortiras lin.)

KVINA AKTO

UNUA SCENO

(Jeppe pendas de pendigilo. Nille. Poste Juĝisto kaj sekvantaro.)

NILLE

(ŝiras siajn harojn, frapas sian bruston kaj krias:) Aĥ, aĥ! ĉu eblas ke mi vidu mian mildan edzon pendi tiel honte de pendigilo! Aĥ, mia karega edzo! Pardonu al mi se mi kontraŭis al vi. Aĥ, aĥ! Mia konscienco vekiĝas; tro malfrue mi nun pentas mian akran konduton; nur nun mi bedaŭras vian foreston; nun mi rekonas kian mildan edzon mi perdis. Aĥ, ke mi povus savi vin de la morto per mia propra vivo kaj mia sango!

(Ŝi viŝas siajn okulojn kaj ploras amare. Intertempe la dormigilo ĉesis efiki. Jeppe revekiĝas kaj vidas sin pendanta en pendigilo kun manoj dorse ligitaj; li aŭdas sian edzinon plendi, kaj parolas al ŝi.)

JEPPE

Estu kontenta, mia kara edzino, ni ĉiuj iros tiun vojon. Iru hejmen kaj zorgu pri via domo kaj pri miaj infanoj. Mian ruĝan jakon vi rekudru por eta Kristofer; kio restos, tion Marte havu por ĉapelo. Antaŭ ĉio zorgu pri mia plurkolora ĉevalo, ke ĝi estu bone flegata; ĉar mi amis tiun beston, kvazaŭ ĝi estus mia samsanga frato. Se mi ne estus morta, mi multe pli al vi dirus.

NILLE

A... a... a...! Kio estas? Kion mi aŭdas? Ĉu mortinto povas paroli?

JEPPE

Ne timu, Nille! Mi al vi faros neniun malicon.

NILLE

Aĥ mia karega edzo! Kiel vi povas paroli, kiam vi estas morta?

JEPPE

Mi mem ne scias kial. Sed aŭdu, mia kara edzino! Kuru kiel fajro, kaj serĉu por mi por ok ŝilingoj da brando; ĉar mi soifas pli nun, ol kiam mi estis vivanta.

NILLE

Fi, vi bruto! Vi kotulo! Vi venena drinkulo! Ĉu vi ne drinkis sufiĉe dum via vivanta vivo? Ĉu vi besthundo ankoraŭ soifas, nun kiam vi estas morta? Jen kion mi nomas kompleta fiporko.

JEPPE

Tenu la buŝaĉon, vi kotino! kaj kuru tuj serĉi brandon. Se vi ne faros, Diablo splitu min, ĉu mi ne fantome vizitu vin ĉiun nokton en la domo. Sciu ke mi ne plu timas “Majstron Erik”; ĉar nun mi ne sentas batojn.

(Nille kuras por serĉi “Majstron Erik”, revenas kaj batas lin pendantan de la pendigilo.)

JEPPE

Aj, aj, aj! ĉesu Nille! ĉesu! vi mortbatas min denove, aj, aj, aj!

JUĜISTO

Aŭdu, virino! ne batu lin plu. Estu kontenta; pro vi ni pardonos vian edzon pro lia delikto, kaj ree verdiktos lin al la vivo.

NILLE

Aĥ ne, bona Sinjoro! Lasu lin nur pendi! ĉar li ne meritas vivi.

JUĜISTO

Fi! vi estas malbona virino; foriru aŭ ni pendigos vin flanke de li.

(Nille forkuras.)

DUA SCENO

(Jeppe kaj la tribunalo. Jeppe estas prenata de la pendigilo.)

JEPPE

Aĥ, bona sinjoro Juĝisto! Ĉu estas certe, ke mi denove estas tute vivanta, aŭ ĉu mi fantomas?

JUĜISTO

Vi estas tute vivanta; ĉar tiu tribunalo, kiu povas kondamni vin el la vivo, povas ankaŭ reverdikti vin en la vivon. Ĉu vi ne komprenas tion?

JEPPE

Ne, je Diablo tion mi ne komprenas; sed mi kredas, ke mi estas reaperanto, kiu fantomas.

JUĜISTO

Ej, vi stultulo! Tio estas ja facile komprenebla. Tiu, kiu prenas aĵon de vi, povas ja ĝin al vi redoni.

JEPPE

Permesu do al mi pendigi la Juĝiston nur pro ŝerco, kaj vidi ĉu mi poste povos reverdikti lin al la vivo?

JUĜISTO

Ne, tio ne estas farebla; ĉar vi ne estas juĝisto.

JEPPE

Sed ĉu mi do denove estas vivanta?

JUĜISTO

Jes, vi estas.

JEPPE
Kaj tial mi ne fantomas.

JUĜISTO
Certe ne.

JEPPE
Kaj ne estas reaperanto?

JUĜISTO
Ne.

JEPPE
Ke mi estas la sama Jeppe sur la Monto kiel antaŭe?

JUĜISTO
Jes.

JEPPE
Ke mi ne estas fantomo?

JUĜISTO
Ne, certe ne.

JEPPE
Bonvolu ĵuru por mi, ke tio estas vero.

JUĜISTO
Jes, mi ĵuras al vi, ke vi estas vivanta.

JEPPE
Petu, ke la Diablo splitu vin, se ne estas vero.

JUĜISTO
Ej! kredu niajn vortojn, kaj danku nin, ke ni estis tiom indulgaj rejuĝi al vi la vivon.

JEPPE
Mi dankus vin pro tio, ke vi ree malligis min, se vi mem ne pendigis min.

JUĜISTO

Estu kontenta, Jeppe, kaj raportu kiam via edzino denove batos vin, kaj ni certe trovos rimedon. Jen, kvar taleroj, por kiuj vi dum kelka tempo povas gajigi vin, kaj ne forgesu trinki je nia sano.

(Jeppe mankisas kaj dankas. La tribunalo foriras.)

TRIA SCENO

JEPPE

(sola) Mi nun travivis duonan jarcenton, sed en tiu longa tempo ne okazis al mi tiom, kiom dum la lastaj du tagoj. Estas diablaj historioj, kiam mi vere pripensas: Unu horon ebria farmisto, sekvan horon Barono, poste denove farmisto, jen morta, jen viviĝinta pendante de pendigilo, kio estas la plej stranga. Eble estas tiel, ke kiam oni pendigas vivantajn homojn, ili mortas, kaj kiam oni pendigas mortintojn, ili reviviĝas. Mi imagas al mi, ke glaso da brando gustos delikate post tiaj travivaĵoj.—Hej, Jakob ŝuisto, elvenu!

KVARA SCENO

JAKOB

Bonvenon reen de la urbo! Ĉu vi ricevis la sapon por via edzino?

JEPPE

Aj, vi fripono; sciu al kiu homo vi parolas. Ĉapon sub la brakon! Ĉar vi estas nur kanajlo kompare kun tia ulo kiel mi.

JAKOB

Tiajn vortojn mi ne tolerus de iu alia, Jeppe. Sed vi al mia domo ne avaras ĉiutagan ŝilingon; tial mi ne konsideras tro pedante.

JEPPE

Ĉapon sub brakon, mi diras, vi skuster!

JAKOB

Kio okazis al vi survoje, ke vi fariĝis tiel hispaneca?

JEPPE

Sciu, ke mi pendiĝis, post kiam mi parolis kun vi.

JAKOB

Tio ja ne estas tiel dignoplena. Tiun feliĉon mi ne envias al vi. Sed aŭskultu, Jeppe! kie vi trinkis vian bieron, tie vi vomu vian feĉon. Vi drinkas vin ebria aliloke, sed venas al mia domo nur por fari kvereladon.

JEPPE

Rapide ĉapon sub brakon, fripono! Ĉu vi ne aŭdas kiel sonoras en mia poŝo?

JAKOB

(kun la ĉapo sub la brako) Diable! de kie vi ricevis monon?

JEPPE

El mia Baronejo, Jakob. Mi rakontos al vi, kio okazis al mi; sed unue verŝu glason da medo; ĉar mi estas tro fiera por trinki danan brandon.

JAKOB

Je via sano, Jeppe!

JEPPE

Nun mi rakontos al vi, kio okazis al mi. Kiam mi forlasis vin, mi endormiĝis; kiam mi vekiĝis, mi estis Barono kaj trinkis min ebria denove per kanajlo-sek; kiam mi fariĝis ebria de kanajlo-sek, mi revekiĝis sur sterkejo; kiam mi vekiĝis sur la sterkejo, mi denove kuŝigis min por dormi, kun espero ke mi denove dormigu al mi la baronejon; sed mi spertis, ke ne ĉiam tiel eblas; ĉar mia edzino vekis min pere de "Majstro Erik" kaj tiris min en la domon per la haroj sen iel ajn respekti tian homon, kia mi estis. Ĵus en la domo, mi estis puŝata eksteren, kapon antaŭen, kaj vidis min inter aro da gripomenusoj, kiuj kondamnis min el la vivo kaj mortigis min per veneno; kiam mi estis morta, ili pendigis min, kaj kiam mi estis pendigita, mi ree fariĝis vivanta, kaj kiam mi denove estis vivanta, mi ricevis kvar talerojn. Tia estas la historio; sed kiel tiaj aferoj povas okazi, mi lasas al vi pripensi.

JAKOB

Ha, ha, ha! Estas sonĝo, Jeppe.

JEPPE

Se mi ne havus jenajn kvar talerojn, ankaŭ mi kredus, ke estas sonĝo. Ankoraŭ unu, Jakob; mi ne volas plu pensi pri tiu frenezaĵo, sed trinki por mi ĝis honesta ebrio.

JAKOB

Je via sano, sinjoro Barono! Ha, ha, ha!

JEPPE

Vi eble ne povas kompreni, Jakob?

JAKOB
Ne, eĉ ne se mi starus sur mia kapo.

JEPPE
Sed tamen povas esti vero, Jakob; ĉar vi estas malsaĝulo kaj eĉ ne komprenas pli simplajn aferojn.

KVINA SCENO

(Magnus, Jeppe, Jakob.)

MAGNUS
Ha, ha, ha! Nun mi rakontu al vi diable amuzan historion, kiu okazis al viro, kiu nomiĝas Jeppe sur la Monto, kiun oni trovis ebria, dormanta sur la tero, kiun oni vestis per aliaj vestaĵoj, metis en la plej bonan liton de la sinjora biendomo, kaj kredigis al li, ke li estas la Sinjoro, kiam li vekiĝis; denove ebriigis lin, kaj remetis lin en liaj malnovaj, malpuraj vestaĵoj sur sterkejon, kaj jen li vekiĝis kaj imagis, ke li vizitis Paradizon. Mi preskaŭ ridis min morta, kiam mi aŭdis tiun historion de la asistantoj de la intendanto. Je Diablo, mi donus taleron por vidi tiun stultulon, ha, ha, ha!

JEPPE
Kiom pagi, Jakob?

JAKOB
Dek du ŝilingojn.

(Jeppe viŝas sian buŝon kaj foriras tre hontema.)

MAGNUS
Kial tiu ulo tiom rapide foriris?

JAKOB
Estas ĝuste la sama viro, kun kiu oni ludis la ŝercon.

MAGNUS
Ĉu eblas? Mi devas postkuri.—Aŭdu, Jeppe! unu vorton. Kiel statas en la alia mondo?

JEPPE
Lasu min iri en paco.

MAGNUS
Kial vi ne tie pli longe restis?

JEPPE
Kiel tio vin koncernas?

MAGNUS
Ej, rakontu ion pri tiu vojaĝo.

JEPPE
Lasu min trankvila, mi diras; aŭ vi spertos akcidenton.

MAGNUS
Ej, Jeppe! mi multe ŝatus scii ion pri tio.

JEPPE
Jakob ŝuisto! Helpu! ĉu vi toleras, ke oni perfortas min en via domo?

MAGNUS
Mi vin ja ne perfortas, Jeppe; mi nur demandas, kion vi vidis en la alia mondo?

JEPPE
Huj! Helpu! Helpu!

MAGNUS
Ĉu vi ne vidis iujn el miaj prapatroj tie?

JEPPE
Ne. Viaj prapatroj certe estas en la alia loko, kien mi esperas ke vi kaj aliaj kanajloj venos post la morto.

(Liberigas sin kaj forkuras.)

SESA SCENO

(Barono. Lia sekretario. Ĉambristo. Du lakeoj.)

BARONO
Ha, ha, ha! Tiu historio vere valoras oron; mi ne pensis, ke ĝi havus tian bonan efikon. Se vi povas pli ofte tiel amuzigi min, Erik, vi havos ĉe mi altan meriton.

ERIK

Ne, Sinjora Moŝto! mi ne kuraĝas pli ofte ludi tian komedion; ĉar se li batus Sinjoron, kiel li minacis, ni ekhavus aĉan tragedion.

BARONO

Jes, estas vero. Mi iom timis tion; sed mi tiom ŝatis la historion, ke mi preferus lasi min bati, jes eĉ lasi vin pendigi de li, Erik, anstataŭ malkaŝi ĝin. Vi eble intencis same.

ERIK

Ne, Via Moŝto! estus iom strange lasi sin pendigi pro ŝerco; ĉar tia ŝerco kostus tro multe.

BARONO

Ej, Erik! similan konduton oni ja vidas ĉiun tagon. Se ne ĝuste sammaniere, do homoj simile prenas siajn vivojn pro diboĉo. Kiel ekzemplo: Iu havas malfortan naturon, kaj antaŭvidas, ke li perdos vivon kaj sanstaton pro drinkado, sed tamen atakas sian korpon, kaj ofte riskas vivon kaj sanstaton pro unuvespera ĝuado. Kaj jen alia ekzemplo: La grandaj veziroj en Turkio plej ofte estas strangolataj aŭ sufokataj per ŝnuro ĝismorte, kelkaj la saman tagon, kiam ili fariĝis veziroj, aliaj nur kelkajn tagojn poste; kaj tamen ĉiuj al tio vetkuras sole kvazaŭ por esti pendigataj kun alta titolo. Kaj jen tria ekzemplo: Oficiroj batalinvitas unu la alian riske de vivo kaj animo por nomiĝi kuraĝuloj, kaj duelas pro neniaĵo eĉ kontraŭ siaj superuloj, kiuj senpere ekspedos ilin. Mi ankaŭ opinias, ke troviĝas centoj da enamiĝintaj homoj, kiuj post plezuro de unu nokto volonte lasus sin mortigi en la mateno. Oni vidas dum sieĝoj, ke aroj da soldatoj forkuras al sieĝataj urboj, pri kiuj ili scias, ke ili kapitulacos; kaj por sekure vivi unu tagon lasas sin pendigi la sekvantan. La unua rilato ne estas pli fidinda ol la dua. En pasintaj tagoj oni vidis filozofojn ĵeti sin mem en akcidenton, sole por esti laŭdataj post sia morto.—Tial mi certe kredas, Erik, ke vi preferus lasi vin pendigi anstataŭ fuŝi tiun delikatan historion.

(Al la spektantoj:)

El tiu aventuro nun ni lerni devu,ke simplajn homojn tuje honore ni ne levu.Pli riske tio estas, ol teni en subprem'Tiun, kiu grandas pro virto de si mem.

Do se farmist' tro tuje al regad' atingos,anstataŭ sceptron skurĝon li baldaŭ sur nin svingos.Kaj por aŭtoritato tiranon ni ekhavos.Vilaĝa Nero do ĉe la stirilo staros.

Ĉu Kajus aŭ Falaris[13] sin montris pli tirano,ol per rabia povo tiu kamparano.Per branĉo, pendigil' kaj rad' minacis ninfarmisto tiu antaŭ ol maturigi sin.

Ni tial estron de plugilo ne plu prenu.Farmisto al la trono ne senpere venu.Ĉar jen el sia stato humila vilaĝan'ŝanĝiĝus pro la povo baldaŭ en tiran'.

[Piednoto 13—Caius Caligula (romia imperiestro) kaj Phalaris (tirano en Agrigento). Ambaŭ estis kruelaj regantoj.]

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK JEPPE SUR LA MONTO; AŬ LA TRANSFORMITA KAMPARANO ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE